sub la suda kruco ★

ESPERANTO



Recenzo de *Flugi kun kakatuoj* far Trevor Steele

Esperanto en *SBS*

AEA kongreso 2011

Mondeto - intervjuo kun Penny Vos

Vizito al pacifika paradizo

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj
volumo 18 [4] • numero 104 • decembro 2010
ISSN 1038-9380



ESPERANTO
SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIOJ

volumo 18 [4] • numero 104 • decembro 2010

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktoroj | Chris Krägeloh & Ŝandor Monostori
Kontaktadreso | **esk2@esperanto.org.au**
P.O. Box 1097
Bendigo Central, Vic 3552, Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas aŭtomate sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEA | www.esperanto.org.nz – nzea@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al *ESK*

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk2@esperanto.org.au".
Limdato por kontribuoj por la sekva numero:


15a de februaro 2011

La redaktoro rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

Copyright @ 2010, AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Sur la kovrilo: Konstruaĵo en la tereno de la Universitato de Adelajdo, kie okazos la 2011a Esperanto-kongreso de AEA.



6 Feliĉan naskiĝdatrevenon *SBS!*



7 **Vizito al Pacifika Paradizo**

10 *Kuraĝo*



11 *AEA* **kongreso**



14 **Recenzo:** *Flugi kun kakatuoj*



16 Vizito al franca festivalo en Melburno

19 La ŝlosilo

20 Trevor Steele - 70



24 *Mondeto* - **intervjuo kun Penny Vos**

29 *AEA* President's Report

Antaŭparolo

Karaj legantoj de nia gazeto,

nun, kiam ni eniros la trian jaron de la novstila *ESK*, indas rigardi la pasintan kaj estontan vojon de nia gazeto. Kiel multaj publikaĵoj en la Esperanta mondo, ni dependas tute de la tempa malavareco de kontribuantoj. Al ĉiuj kontribuintoj, mi sincere sendas mian dankesprimon! En ĉi tiu antaŭparolo, mi nun volas inviti aliajn legantojn kontribui al nia gazeto.

Niaj vivoj ofte estas plenigitaj de diversaj devoj, kaj *iam* inter tiuj devoj ni penas trovi tempon por niaj ŝatokupoj kaj pasioj – en tiu kazo Esperanto. Kelkaj el ni eĉ aranĝas sian vivon tiel, ke la ŝatokupo Esperanto povas esti ĝuata samtempe kun aliaj ŝatokupoj. Se vi rigardas la Gvidlibron de *UEA*, vi povas vidi la longan liston de grupoj (religiaj, politikaj, sociaj), kiuj uzas Esperanton. Do, se vi havas ekscitan Esperantan ŝatokupon, bonvolu sendi mallongan (aŭ eĉ longan) kontribuon al *ESK*. Tiel, ni ankaŭ povas montri al ne-esperantistoj, kiun oni povas fari per Esperanto!

Chris Krägeloh

Foto: Nia novstila ESK *estas eble iomete kiel tiu papilio. Fariĝis ĝi bunta, sed nur ĵus komenciĝis ĝia vivo post transformado.*



foto de Anni Krägeloh

Ni aŭskultu kaj lernu

***Esperanto por infanoj* de G. Gladstone Solomon.**
PAROLATA VERSIO por pura plezuro aŭ kiel refreŝiga kurso.
DVD aŭ CD $40 + $2.50 por sendkostoj (inkluzivas senpagan ekzempleron de la libro).

Se via Esperanto estas iomete rusta, aŭ se vi havas nesufiĉajn okazojn ĝui parolatan Esperanton, vi aŭskultu do ĉi tiun ĉarman etan libron de G. Gladstone Solomon, *Esperanto por infanoj*. La Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio sonbendigis ĉiujn 26 ĉapitrojn, bele rakontitaj de Vera Payne. Instruistoj kaj lernantoj de iu ajn aĝo povas profiti per ĉi tiu valora rimedo. Aŭskultu, laŭtlegu aŭ parolu kun la parolantino.

Por mendi, bonvolu enpoŝtigi vian ĉekon al:

The Secretary, Esperanto League of WA, 87 Contour Drive, Mullaloo WA 6027, Australia.

Ĉu vi konas la Komunan Eŭropan Referenckadron?

Kunlabore kun *edukado.net* la Universala Esperanto-Asocio preparis internacian ekzamensistemon, kiu konformas al la postuloj de Konsilio de Eŭropo kaj ekfunkciis en 2008. Ĝi ebligas ekzameniĝi pri Esperanto laŭ la postuloj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) sur ties niveloj B1, B2 kaj C1. La ekzamenoj estas akreditataj de ITK (ŝtata lingvoekzamena centro en Budapeŝto) kaj funkciigataj kunlabore kun ĝi.

La bona novaĵo estas ke du aŭstralianinoj sukcesis fari ekzamenon en Kubo kaj ricevis imponan atestilon:

Hazel Green – Numero 178, Lingvoekzamensistemo ORIGO, Nivelo meza (B2)
Jennifer Bishop – Numero 196, Lingvoekzamensistemo ORIGO, Nivelo supera (C1).

Espereble dum la venontaj jaroj pli da esperantistoj el Aŭstralio, Nov-Zelando kaj tuta Oceanio havos la okazon fari KER-ekzamenon. Kial ne en Adelajdo, ĉe AEA Jubilea Kongreso (9a ĝis 17a de Julio)? Serĉu informon pri eventoj ĉe *www.edukado.net* aŭ ĉe Centra Oficejo, UEA, kie eblas ankaŭ aĉeti gvidilon por prepariĝi por la ekzamenoj - *Esperanto de nivelo al nivelo*, 136 paĝoj EUR10.50.

AEA direktoro pri edukado, Jennifer Bishop

Feliĉan naskiĝdatrevenon *SBS*!

Sandor parolas Esperante en tutaŭstralia televida elsendo

La tutaŭstralia televida kanalo *SBS* (*Special Broadcasting Services*) festas ĉi-jare sian tridekjariĝon. Kiel naskiĝtaga specialaĵo la redakcio mallonge intervjuis diversajn homojn, kiuj propramaniere bondeziris al la festanto.

Per tute originala maniero: parolante Esperante, salutis *SBS*-n Sandor Horvath. Surhavante verdan Esperantan T-ĉemizon en la filmeto li prezentas sin en la angla kaj diras, ke li estas esperantisto. Kion li diras poste, tio estas jam en Esperanto – kun anglaj subtekstoj! Sandor gratulas al la festanta *SBS* kaj diras, ke estus bone vidi en ĝia programo ankaŭ Esperantan filmon.

Temas pri 20 sekundoj. Malmulte, sed ege multe! Despli, ke tiu ĉi salutmesaĝo aperadas de la 24a de oktobro kaj videblos en la televido ĝis la fino de decembro en plej diversaj tempoj en la interprogramaj spacoj de *SBS*. Kun iom da bonŝanco ankaŭ vi povas vidi ĝin. Kaj se ne, jen la *Youtube* adreso, kie ĝi daŭre spekteblas:

http://www.youtube.com/watch?v=UIw7sccI0_E

Nuntempe mia plej ŝatata televida heroo estas vi, Sandor!

- Katja Steele



Vizito al Pacifika Paradizo

de David Ryan

Eble vi pensas ke ĉi tiu artikolo temas pri Nov-Zelando. Vi ne tute malpravas, ĉar Nov-Zelando certe estas pacifika paradizo. Tamen, ĉi tiu artikolo temas pri alia paradizo: Nov-Kaledonio, kiun mi vizitis kun mia familio en julio de 2010.

Post multaj monatoj da senĉesa pluvado kaj malvarmo en Nov-Zelando, ni vere volis viziti varman ferian lokon. Ni decidis viziti pacifikan insulon, sed jam vizitis Fiĝion antaŭ multaj jaroj. Tial, ĉi-foje ni volis koni novan landon, kaj ni elektis Nov-Kaledonion pro ties varma vetero kaj franceco (Nov-Kaledonio estas teritorio de Francio).

Nov-Kaledonio situas meze inter Nov-Zelando kaj Aŭstralio, je nur 2 horoj kaj 20 minutoj de Aŭklando. Tien flugas *Air New Zealand* kaj *Air Calin*. Ankaŭ estas rektaj flugoj el Sidnejo kaj Brisbano. Tamen, malgraŭ ĝia proksimeco, turistoj el Nov-Zelando kaj Aŭstralio ŝajne preferas Fiĝion kaj aliajn insulojn ĉar Nov-Kaledonio estas multekosta lando ... kaj eble pro la fakto ke oni parolas tie fremdan lingvon (*quelle horreur*!).



Ni vizitis Nov-Kaledonion en vintro kaj, pro tio, pluvetis kelkfoje kun iom forta vento. Tamen, estis pli varme ol en Nov-Zelando kun temperaturo inter 18 kaj 25 gradoj. Ni eĉ ĝuis kelkajn horojn ĉe la plaĝo kie ni iom sunbruniĝis. Mi imagas ke la somero en Nov-Kaledonio devas esti tre bela.

Ni vizitis nur la ĉefurbon, Numeo. La loĝantaro de Nov-Kaledonio estas proksimume 250.000, kun proksimume 100.000 en Numeo. Ni trovis tie belan ĉefplacon, butikojn, katedralon, 2-3 muzeojn, multajn restoraciojn kaj, tuj apud la urbcentro, multajn belajn plaĝojn: Numeanoj estas ege bonŝancaj ĉar ili laboras aŭ loĝas tuj apud la plaĝo kaj facile povas sunbruniĝi tie dum manĝhoro aŭ post laboro. Ni ne havis tempon por koni aliajn regionojn de Nov-Kaledonio. Certe estas multaj plaĝoj, arbaroj, kaj aliaj etaj insuloj. El la aviadilo mi ankaŭ vidis multajn montetojn – eble taŭga destino por aventuremaj turistoj.

Turistoj al Nov-Kaledonio venas plejparte el Francio, Japanio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Oni trovas informojn kaj afiŝojn por turistoj en la franca, angla, japana, kaj kelkfoje en la korea lingvo. Onidire, nuntempe alvenas pli da krozŝipoj, precipe el Aŭstralio. Por ni el Nov-Zelando, ni trovis ke Nov-Kaledonio estas ĝenerale multekosta lando, kvankam ni sukcesis trovi bonkvalitajn restoraciojn kie ni bone manĝis sen tro multe elspezi. Ni vidis prezojn de libroj, vestaĵoj, ŝuoj, kaj diskoj (verŝajne ofte importitaj el Francio)...kaj rapide decidis aĉeti nenion. Bonŝance por la nov-kaledonianoj, salajroj en la lando estas altaj, sed prezoj por vizitantoj kiuj ne tiom enspezas estas relative altaj. Kvankam Nov-Kaledonio estas parto de Francio, oni ne uzas tie la eŭron, sed la centrapacifikan frankon.



La loĝantaro de Nov-Kaledonio estas vera miksaĵo de diversaj rasoj: precipe indiĝena kaj franca, sed ankaŭ ĉina kaj vjetnama rasoj. 'Blankuloj' (francoj) aŭ naskiĝis tie aŭ venis el Francio por labori aŭ emeritiĝi en Nov-Kaledonio. Mi povas imagi ke tropika Nov-Kaledonio devas esti preferata loko por francoj kiuj volas emeritiĝi: Oni eskapas la malvarman vintron en Eŭropo kaj trovas similajn vivkutimojn.

Do, ĉu ni trovis francecon en Nov-Kaledonio? Responde: jes! La lingvo, kiun oni aŭdis ĉie estas la franca (ankaŭ estas indiĝenaj lingvoj). Oni rigardas francajn televidprogramojn per satelito (vespera novaĵprogramo el Parizo aperas matene!), butikoj kaj restoracioj vendas francajn varojn kaj manĝaĵojn kaj, kiel en Francio, ni vidis multajn grupojn de biciklantoj kaj globludantoj (*boules*), francajn aŭtomobilojn (*Renault, Citroën, Peugeot* ktp), kaj personojn surstrate kun tipa franca pano (*baguette*) surbrake. Miaopinie, Fiĝio kaj aliaj pacifikaj insuloj estas taŭgaj vizitlokoj por ripozi sur plaĝo sub la suno. Nov-Kaledonio proponas same, sed ankaŭ sufiĉe interesan kaj modernan ĉefurbon kaj eblecon por sperti iom da franca kulturo kaj lingvo.

Finfine, ni vizitis lokajn samideanojn kaj ĝuis kelkajn horojn babilante en nia kara lingvo.★



Kuraĝo

tradukis el la angla Tom O'Grady

En la montetoj apud *Townsville* staras luksa domego en bela parko kun ĉiu imagebla bezonaĵo, inklusive de olimpik-granda naĝbaseno. Tie loĝas la bilionulo Ken Banko, fama industriisto.

Iun varman postagmezon li gastigis tie en la malantaŭa korto kelkdek diversajn konatojn. Ĉiuj gaje manĝis kaj trinkis ĝissate. Ekvesperiĝis, kaj Ken alvokis, "Venu al la naĝejo, amikoj. Mi volas paroli al vi." Ĉiuj ariĝis ĉirkaŭ la baseno.

Ken, staranta ĉe unu fino, komencis paroli: "Vi scias, amikoj, ke per multaj kuraĝaj entreprenoj mi riĉegiĝis, ja tiom ke mi ne povas elspezi ĉiom! Sed lastatempe mi timas, ke la kuraĝo malaperas el la aŭstralianaro. Eble ŝajnas kaprice, sed tamen, pro tiu ĝeno, mi aranĝis etan teston. Rigardu en la basenon!"

Ĉiuj klinis sin por vidi en la malhelan akvon, sed distingis nenion. Ken daŭrigis: "Tien mi enmetis grandan salakvan krokodilon, okmetran – kaj malsatan! Ĉu vi ne rimarkas la okuloin?"

Ĉiuj retrenpaŝis de la basenrando.

Pli laŭte li vokis, "Jen mia propono – kaj defio! Se iu el vi aŭdacas – kaj kuraĝas – salti en la akvon, mi donos al tiu unu milionon da dolaroj. Ĉu ĉi tie estas tia kuraĝulo?"

Ekestis kelkaj momentoj da silento kaj senmovo. Tiam – plaŭdego ĉe la alia fino de la akvo! Ekmiro – ĉu vere iu spitas la defion?

Sulkis la akvo – io granda strekis al la malproksima fino. Tie oni vidis nur furiozajn kirladon kaj plaŭdadon, ĝis el la konfuzo aperis la formo de la reptiliego – kun viro sur ĝia dorso, alkroĉante per la kruroj ĉirkaŭ ĝia torso. La brakoj estis ĉirkaŭ ĝia gorĝo, tiregantaj la kapegon malantaŭen. La titana lukto daŭris ĝis – krak, la spino de la povra besto rompiĝis.

Multaj manoj helpis la heroon el la baseno. Tie li staras, tremanta kaj stertoranta dum akvo gutegis el liaj vestoj. Ken entuziasme aplaŭdis. "Jen, kia kuraĝo! Gratulon al vi, Ĝim! Mi ne atendis tion de vi. Heroe! La KURAĜO ne malaperis. Vi ja gajnis la milionon."

Raŭkvoĉis Ĝim: "Mi ne deziras la milionon!"

"Ĉu? Ĉu ne monon? Ĉu eble jakton? Luksan domon?"

"Mi ne volas tiujn!"

"Bonrasan kurĉevalon? Belan novan aŭton?"

"Nenion ajn tian!"

"Kion do? Nur diru!"

"Nur unu solan aferon mi volas – la nomon de tiu kanajlo, kiu puŝis min en la akvon!"

AEA kongreso 2011

NIA UNIVERSITATO

La kongresejo por nia centjara jubilea kongreso venontjare estos la Universitato de Adelajdo. Jen, ni enkondukas "nian" universitaton.

NIA - ĉar aŭstralia. Temas pri la Universitato de Adelajdo en la ĉefurbo de Suda Aŭstralio. Ĝia historio komenciĝis en 1872, kiam la Baptista, Kongregacia kaj Presbiteriana preĝejoj en la provinco de Suda Aŭstralio fondis Unian Kolegion (Union College) "por provizi al junuloj edukadon super lerneja nivelo". En tiu sama jaro riĉa bienisto kaj minejposedanto Walter Watson Hughes donacis al la nova kolegio en tiu tempo grandegan sumon de 20 mil pundoj, kio pli ol sufiĉis por krei universitaton. Nur du jarojn poste la nova universitato estis jam fondita, sed la formala inaŭguro okazis la 25an de aprilo 1876.

La Universitato de Adelajdo estas la tria plej malnova universitato en Aŭstralio, sed la unua el ili (en 1881), kie oni akceptis al la akademiaj kursoj virinojn (antaŭ Oksfordo en 1920 kaj Kembriĝo en 1948). La adelajda estis la unua

OUR UNIVERSITY

The site of our centenary Esperanto Congess in 2011 will be the University of Adelaide. Here then is an introduction to "our" university.

OURS - because it's Australian. We are talking about the University of Adelaide in the capital of South Australia. Its history began in 1872, when the Baptist, Congregational, and Presbyterian communities in the colony of South Australia founded Union College "to provide to youth education above the level of secondary school". In that same year a rich pastoralist and mine-owner, Walter Watson Hughes, offered the new college a sum huge at that time, twenty thousand pounds, which was more than enough to create a university. Only two years later the new university was founded, but the formal inauguration occurred on 25th April, 1876.

The University of Adelaide is the third oldest in Australia, but the first (in 1881) to admit women to academic courses (ahead of Oxford in 1920 and Cambridge 1948). It was also the first Australian university to confer degrees in

aŭstralia universitato, kiu aljuĝis diplomojn en scienco, kaj la unua diplomito estis virino – Edith Emily Dornwell. La adelajda estas la unua aŭstralia universitato, kiu starigis muzikfakon kun rajto aljuĝi doktorajn diplomojn, kaj la unua, kiu aljuĝis tiun titolon al virino (Ruby Davy en 1918). Kavalirino Roma Mitchell, diplomitino de la Adelajda Universitato, estis la unua plej altranga advokatino en Aŭstralio, kancelierino de aŭstralia universitato (Adelajda), kaj la unua virino, kiu iĝis guberniestro de aŭstralia provinco (Suda Aŭstralio).

Kelkaj aliaj nomoj de eminentuloj kun ligoj al la Universitato de Adelajdo estas: kavaliro William Bragg, kiu dividis la Nobel-premion pri fiziko por esplorado de kristalografio per rentgenaj radioj kun sia filo – ankaŭ iama studento de la sama universitato, kavaliro Lawrence Bragg (1915); lordo Howard Florey, kiu pioniris la aplikon kaj produktadon de penicilino (Nobelpremio en 1945); kavaliro Douglas Mawson – antarkta esploristo; d-ro Andy Thomas, kosmonaŭto; laŭreato de la Nobel-premio pri literaturo (2003), J.M. Coetzee; kaj d-ro J.Robin Warren, kiu ricevis Nobel-premion pri medicio en 2005. Ekde sia fondiĝo la Universitato havis 103 gajnintojn de la stipendio *Rhodes*. Nuntempe studas tie pli ol 23 mil studentoj, el kiuj proksimume 5.500 estas el eksterlando – el 95 landoj de la mondo. La Universitato mem havas ligojn kun 138 universitatoj en 25 landoj. La akademiaj studoj okazas en kvin fakultatoj: inĝenieraj, kompulitaj kaj matematikaj sciencoj; san-sciencoj; humanismaj kaj sociaj sciencoj; profesioj; kaj sciencoj.

NIA - ĉar ĝuste la Universitato de Adelajdo gastigis la unuan kongreson de la aŭstralia esperantistaro kaj tiel partoprenis la naskiĝon de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Vendredon, la 27an de oktobro 1911 en la Universitato de Adelajdo la kongreson oficiale malfermis lia guberniestra moŝto kavaliro Day Bosanquet.

science, and its first graduate was a female – Edith Emily Dornwell. Adelaide was the first Australian university to set up a Chair of Music with the right to give doctoral degrees, and the first to grant that degree to a woman (Ruby Davy in 1918). Dame Roma Mitchell, a University of Adelaide graduate, was the first Australian woman to be a QC, South Australian Supreme Court Judge, Chancellor of an Australian university (Adelaide) and the first female to be Governor of an Australian State (SA).

Some other historic names associated with the University of Adelaide include: Sir William Bragg, who shared the Nobel prize for physics for research in crystallography using X-rays with his son, also a former student of this same university, Sir Lawrence Bragg (1915); Lord Howard Florey, who pioneered the application and production of penicillin (1945); Sir Douglas Mawson, the Antarctic explorer; Dr. Andy Thomas, an astronaut; the Nobel laureate for literature in 2003, J.M. Coetzee; and Dr. J. Robin Warren, who received the Nobel Prize for medicine in 2005. Since its foundation the University has had 103 Rhodes Scholars. At present it has more than 23,000 students, of whom approximately 5,500 are from overseas, from 95 countries. The University itself has links with 138 universities in 25 countries. Academic studies are provided in five faculties: engineering, computing and mathematical sciences; health sciences; humanities and social sciences; professions; and sciences.

OURS - because it was the University of Adelaide that hosted the first congress of Australian Esperantists, and so participated in the birth of the Australian Esperanto Association. On Friday, the 27th of October 1911, in the University of Adelaide, the congress was officially opened by the

La malfermon ĉeestis la kanceliero kaj kavaliro Samuel J. Way kaj pluraj profesoroj de la universitato.

NIA - ĉar la Universitato de Adelajdo ne nur pretas akcepti nian jubilean kongreson en 2011, sed ĝi senpage disponigos al ni 6 ejojn, kiuj normale kostus $18.000. Temas pri modernaj, bone ekipitaj salonoj, kaj la plej granda el ili povas akcepti pli ol 200 homojn. Ni ankaŭ aranĝas aliaj programoj pri Esperanto, kiel prelegoj de la eminenta esperantisto Humphrey Tonkin al studentoj de la universitato kaj akademianoj, kaj diskutvesperoj.

Rapidu do aliĝi, dum restas libera loko!

governor, Sir Day Bosanquet. The inauguration was attended by Sir Samuel J. Way and several professors of the University.


OURS – because the University of Adelaide is not only willing to host our centenary congress in 2011, it will also place at our disposal, free of charge, six rooms, whose cost would normally be $18,000. They are modern, well-equipped rooms, and the biggest can accommodate more than 200 people. We are also arranging other, Esperanto-related, programs, such as lectures by the prominent Esperantist Humphrey Tonkin to university students and staff, and discussion evenings.

So, enrol quickly while there are still free

Iru al: Go to:

aea2011kongreso.ning.com

de Katja Steele



Recenzo



Trevor Steele. *Flugi kun kakatuoj*. Eldonis Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, Nederlando. 2010. 254 paĝoj, broŝuritaj. ISBN: 978-90-77066-46-1

Aŭstralio estas malmulte konata en la granda mondo; plejparte oni scias pri la Havenponto kaj la Operdomo de Sidnejo, la Pokalo Melburna, kaj Paul Hogan. Pri la detaloj de ĝia historio scias preskaŭ neniu. Kaj pri tiu parto de ĝia historio kiun detale priskribas Trevor Steele en sia nova romano, eĉ malmultaj aŭstralianoj scias.

En la komencaj jardekoj de la deknaŭa jarcento, la britoj decidis kolonizi Okcidentan Aŭstralion. Laŭ la tiama kutimo de Britio, kiu celis kiom eble regi la mondon per sia imperio, kolonizi signifis simple deklari ke iu teritorio apartenas al ĝi, mortigi aŭ sklavigi la jamajn loĝantojn en tiu teritorio, kaj doni aŭ vendi parcelojn al almigremaj britoj.

Ne vere mirindas, ke la aborigena loĝantaro de Okcidenta Aŭstralio rigardis tion kiel agresan invadon, kaj klopodis defendi sian teritorion. La britoj havis kaj uzadis fusilojn, la aborigenoj nur lancojn. Avantaĝa por la britoj estis la telegraflineo inter Perto kaj la britaj kolonioj en la orienta parto de Aŭstralio. Tio signifis ke ili povas peti pliajn provizojn da fusiloj, kugloj, kaj helpantoj. Avantaĝa por la aborigenoj estis ilia detala kono de la tereno, precipe valora por ili estis detala kono de la mont(tet)oj, la arbaroj, kapablo organizi embuskajn atakojn.

En la romano, ni komence sekvas la karieron de juna brito, Billy Dixon, kiu volas riĉigi sin per la laŭdire trovebla amasa oro ekzistanta en la okcidentaŭstralia tero, kaj kiu firme kredas ke la aborigenoj estas primitivuloj intelektomankaj, venkendaj fare de la Civilizituloj, t.e. la britoj kaj la brita imperio. Sed la oro-riĉebleco montriĝas fantazia, la klimato estas preskaŭ netolerebla, kaj kian laboron oni povas trovi por pergajni sian vivon? Nu, helppolicisto ŝajnas esti la sola fidebla posteno.

Samtempe ni sekvas la karieron de aborigeno nomita Jangabara, kiu celas amori ĉiun virinon trovitan, trovatan, kaj trovotan, malgraŭ la striktaj taburegulo j de la aborigenaj triboj. Lia senfina amoremo kaj malobeo je la sistemo de sekstabuoj instigas la Banubi-tribon lin ekskomuniki, t.e. malagnoski lian rajton resti en la tribo. Li devas tutvere trovi sian propran vojon en la mondo. Ĉar proksimaj triboj estas ne amikemaj (precipe ĉar Jangabara altiris por amoro ĉiujn belajn knabinojn de tiuj triboj), necesas ke li trovu laboron inter la blankuloj. Tie li montras rimarkindan intelekton, kapablon adapti sin al novaj cirkonstancoj, tre grandan talenton lerni kaj uzi fusilojn, kaj rajdi ĉevalojn. Efektive, li superas ĉiun el la blankuloj per tiuj talentoj, kvankam kompreneble oni ne pagas lin ("kaj kiel utilus mono por primitivulo aborigena?" oni sin demandis). Sed li rajtis loĝi en domaĉeto konstruita el branĉoj. Kaj ĉar aliaj aborigenoj volis mortigi lin, pro lia agado, li ricevis iom da protekto kontraŭ ili.

Nu, neeviteble la situacio iĝis netolerebla en Okcidenta Aŭstralio, kie laŭ la blankuloj la tuta tereno apartenas al la brita kolonio, kaj aborigenoj rifuzantaj akcepti tion devas esti mortigataj.

Multo de la libro priskribas la intergentan militadon, kaj en la fino la aborigenoj trovis sin en la situacio kiu estas tre familiara eĉ en nia propra epoko.

Kiu volas legi plaĉan amromanon, tiu legu alian libron, ne ĉi tiun. Sed kiu volas scii la veron pri la historio de Aŭstralio, tiu tre instruiĝe legos la libron. Post la legado, vi ne tre multe fieros.

Mi opinias ke tiu libro estas unu el la plej gravaj verkoj de Trevor Steele.★

de Donald Broadribb

.....

DECEMBRO 2010

Ankaŭ legu la retrevuon *Mirmekobo*. La redaktoro, Donald Broadribb, regule publikas interesajn artikolojn kaj enigmojn.

Elŝutu el http://www.gazetejo.org/mirmekobo aŭ petu senkostan abonon per mesaĝo al mirmekobo@mac.com



MIRMEKOBO 11

Vizito al franca festivalo en Melburno

de Kam Lee

Je la fino de majo 2010, kelkaj esperantistoj kaj aliaj vizitis monaĥinejan terenon en *Abbotsford*, Melburno. Du el la interesaj konstruaĵoj tie estas la ĉefa monaĥineja konstruaĵo kaj la *Magdalen* azilo. Multaj el la konstruaĵoj estas influitaj de la mezepoka, franca eklezia arkitekturo. La lokaloj estis regataj de religia ordeno kaj estis uzitaj kiel loĝejo, lernejo kaj laborejo por orfinoj, zorgantinoj de la societo kaj knabinoj, kiuj estis konsideritaj en morala danĝero.

Dum nia vizito okazis en la monaĥinejo la melburna franca festivalo *Paris al Provence*, kiu konsistis de kuksapa budo, kantaro, francaj teatraĵoj, kaj aliaj. La kuksapa budo estis unu el la multaj festivalaj budoj kaj ĝi vendis kukaspektajn pecojn de sapo. La sapaj pecoj ŝajnis tiel kukaspekta , ke mi ŝokiĝis post kiam unu el ili estis ordinare tenita de amikino per sia mano. Mi opiniis, ke nun ŝi devas pagi por la kuko ĉar ŝi tuŝis ĝin kaj pro sanrilataj kialoj. Poste, ŝi diris, ke ĝi ne estas reala kuko kaj ŝi fingromontris al mi afiŝon, kiu invitis homojn teni la kukaspektajn sapojn! Estis tiom multaj malsamaj specoj de tiaj pecoj de sapoj, kiuj aspektis kukoj kun kremoj kaj ili aspektis tiom bongustaj! Por mi estus psikologie tre malfacile uzi tiajn pecojn kiel purigilo dum duŝado!

La franca kantantaro "La La La" kantis francajn kantojn en la franca lingvo. Ili estis vestitaj en nigraj vestaĵoj kaj kun bluaj, blankaj aŭ ruĝaj skarpoj, kiuj reprezentas la kolorojn de la franca flago. Ili kantis malrapidan belan kanton, kies melodion mi unue aŭdis antaŭ multaj jaroj dum aŭskultado de la iomete populara klasikmuziko, Capriol Suite, verkita de Peter Warlock en 1926. Mi informiĝis poste, ke Peter Warlock ne verkis la melodion, sed pruntepreni ĝin el renesanca danco. Kia fascina malkovro! Viglaj kantoj estis parto de la kantprogramo kaj poste la kantaro ricevis grandan aplaŭdon.

Ni bedaŭrinde ĵus mistrafis la francan teatraĵeton, kiu estis prezentita de du francaj aktoroj. Tamen, mi povis konversacii kun ili. La komedia intrigo temis pri la konversacio kun burokrato kaj publika oficisto. La burokrato kritikis la oficiston pri la manko de laboro kaj la neefika registara sistemo. Finfine, post aŭskultado de la burokrato, la publika oficisto fiere kaj ĝentile petis pligrandigon de sia salajro.

Poste, kelkaj el ni vizitis aliajn partojn de la tereno. Alia notinda loko estas kafeo je la unua etaĝo de la monaĥinejo. La butiko estas atingebla, per piediro tra kelkaj longaj koridoroj kaj ŝtuparŝakto. Je ĉi tiu loko, oni povas admiri la arkitekturon de la konstruaĵo.

Visit to a French festival in Melbourne

by Kam Lee

Towards the end of May 2010, a group of Esperantists visited the Abbotsford Convent Precinct in Melbourne. Two of the most interesting buildings there are the main convent building and the Magdalen Asylum. Many of the buildings are influenced by medieval, French ecclesiastical architecture. The premises were controlled by a religious order and it was used as a place of living, learning and work for female orphans, female wards of the state and girls who were considered to be in moral danger.

Our visit to the convent coincided with the "Paris to Provence" Melbourne French Festival, which featured diverse stalls, a choir, French theatre and other attractions. The cake-soap stall was one of the many festival stalls and such authentic looking pieces of "cake" that I was shocked when a friend casually picked one up and held it in her hand. I believed that she was now committed to paying for it because it would have been unhygenic to put it back after such handling. But she explained that they were not real cakes and pointed to a poster which invited people to hold them. There were so many kinds of these delicious looking "cream cakes". I must say that I would find it psychologically challenging to use them in my shower!

The choir, "La, La, La", was dressed in black clothes and with either blue, white or red robes to represent the colours of the French flag. One of the French songs that they sang had a slow beautiful melody I had heard many years ago. It was a fairly popular piece of classical music, Capriol Suite, purportedly written in 1926 by Peter Warlock, who in fact, as I found out later, "borrowed" it from a Renaissance dance. After several lively songs the choir was much applauded.

Unfortunately, we just missed the French drama, but I was able to speak with the two actors. The storyline apparently tells of a conversation between a bureaucrat and a public servant. The former criticises the latter about the laziness and inefficiency of the government system. After listening to the bureaucrat, the public servant proudly and courteously asks for a rise in salary.

We later visited another part of the precinct, and, of course, the cafe, which is on the first level of the convent building. A shop can be accessed by walking through two long corridors and a stairwell. From here, the architecture of the building can be admired. And looking down, we can see the courtyard and a small citadel. The Abbotsford Convent Precinct is definitely well worth a visit! ★

Rigardante malsupren, oni povas vidi la korton kaj malgrandan belan citadelon. La *Abbotsford* monaĥineja tereno vere estas vizitinda loko! ★

Kam staras ekstere de la kafejo je la unua etaĝo de la monaĥinejo kaj tenas tason de kafo. En la fono estas parto de la ĉefa konstruaĵo, kiu estas ekzemplo de grandskaleco de la franca eklezia arkitekturo.

Kam is standing outside of the café on the first floor of the convent and is holding a cup of coffee. In the background is the main building, which is an example of the grandeur of French ecclesiastical architecture.






Tiom multe da belaspektaj kukoj, sed ĉiu el ili gustas de sapo! Maldekstre al dekstre estas Philip, Elrae, Miranda, John, Carole, Anna kaj Kon.

So many beautiful cakes, but all of them taste like soap! Left to Right are Philip, Elrae, Miranda, John, Carole, Anna and Kon.

La ŝlosilo



Erin McGifford

Kiam mi estis en Sidnejo lastan jaron ĉe la Esperanto-kursaro, mi spertis etan aventuron en *International House*, la loĝejo por studentoj de la Universitato de Sidnejo. Tiu aventuro rilatas al ŝlosilo.

Kiel ĉiu iama kursanoj scias, ni ĉiuj havas ŝlosilon por nia ĉambro. Kaj ni ne povis eniri la ĉambron sen ĝi, eĉ post mallonga vizito al la lavĉambro. Kiam ajn oni eliras la ĉambron, oni devis pensi: "Ĉu mi havas mian ŝlosilon?"

Mia ĉambro estis tuj apud lavĉambro kaj necesejo kaj mi ne devis promeni longan distancon laŭ la koridoroj. Do por iri tiun etan distancon al la lavĉambro mi ofte eliris de mia ĉambro portante ne multe da vestaĵoj. Ankaŭ, estis la mezo de varmega sidneja somero.

Ĉio iris glate ĝis la lasta mateno de mia restado. Je tiu tago mi devis preni aviadilon por reveni al Nov-Zelando. Mi estis laca kaj malatentema. Mi iris al la lavĉambro por brosi la dentojn. Kiam mi revenis al mia ĉambro - ho ve - mi konstatis ke mi ne portis mian ŝlosilon!

Do kion fari? Mi portis bluzon sed preskaŭ nenion alian. Estis sabato. Mi sciis ke la oficejo estis fermita, kaj ankaŭ ke la butiketo estis fermita. Estis du tagoj post la fino de la kursaro, kaj neniu alia esperantisto restis. La koridoro estis malplena.

